# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo** **septembro 2021**


## RENKONTIĜOJ POSTSOMERAJ

Post la fino de aŭgusto, ni revenas al la kutimaj aktivaĵoj. Pro la necertecoj pri la sanitaraj kondiĉoj, ni ankoraŭ ne povas anonci multajn agadojn por tiu ĉi venonta monato, do atentu la sociajn retojn, retlistojn kaj aliajn komunikilojn de Madrida Esperanto-Liceo.

Tamen, ni jam havas konkretan planon: la venontan sabaton, 4an de septembro ni re-komencas la rendevuojn en la Parko Retiro. La horo estos la kutima, la 18,30 horo. Ankaŭ la loko ne varias: la statuo de Ricardo Codorniu, proksime al la Vitra Palaco (Palacio de Cristal), koordinatoj: 40°24'45"N, 3°40'51"W. Ni kompreneble sekvos la kriteriojn pri KOVIM-prevento kaj renkontiĝos en malgrandaj grupoj kaj je prudenta distanco.

En septembro ni denove malfermos la sidejon la lundojn, sed en la komenco ne estas antaŭ-vidita la organizado de apartaj eventoj. Depende de la evoluo de la pandemio ni studos novajn kriteriojn. Dume, se vi deziras aŭ bezonas viziti la sidejon, ni plu rekomendas ke vi kontaktu antaŭ ol veni, kaj sekvu la prisanajn rekomendojn.




## HISPANA VIRTUALA KONGRESO

Hispana Esperanto-Federacio liveris la unuajn informojn pri la venonta 79a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu, kiel anoncite, okazos virtuale. La datoj estos la 2a kaj 3a de oktobro 2021.

La bazaj informoj, kun la provizora programo, estas konsulteblaj en http://esperanto.es/kongreso kaj jam eblas aliĝi, pere de la adreso: https://esperantujo.io/hef/alighilo/.

Atentu la postajn informojn, kiuj baldaŭ alvenos.

## SOMERAJ RETAJ RENKONTIĜOJ

La Hispana Kongreso estos unu el la lastaj el longa listo da renkontiĝoj okazintaj en la pasintaj monatoj. Kiel ni anoncis en la pasinta somerkomenca eldono de "Nia Voĉo", la ŝancoj renkontiĝi virtuale obliĝis dum tiu ĉi periodo.

La dua Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), organizita de Universala Esperanto-Asocio okazis inter la 17a kaj la 24a de julio, kun aliĝo de 1850 homoj. Aliĝintoj povas plu spekti la prelegojn, renkontojn kaj spektaklojn (inter kiuj prelego de madridano Miguel Fernández pri rememoro de historiaj kamaradoj de SAT) en la retejo de la Kongreso: https://vk.retevent.com/. Ankaŭ troviĝas plu en la reto la diversaj kajeroj de la kongresa kuriero "La Kolombo de Paco": https://vk.esperanto.net/kuriero/.

Ankaŭ la asocioj TEJO (junuloj), ILEI (instruistoj), SAT kaj pluraj landaj asocioj, okazigis siajn proprajn kongresojn. TEJO kaj ILEI elektis novajn estrarojn, kun novaj prezidantoj.

## TAGO DE ESPERANTO

Sekve al la kampanjo de HEF okaze de la Tago de Esperanto, la 26an de julio, kelkaj amas-komunikiloj raportis pri la Tago kaj pri Esperanto ĝenerale.

Substrekindas la sukceso en Aragono, kie la regionaj radio kaj televido elsendis apartajn raportojn pri la Tago. En Aragón TV: en posttagmeza teleĵurnalo "Noticias 1" aperis filmaĵo en la sidejo de la loka grupo, kun interveno de Pablo Conesa kaj Lorenzo Noguero. En Aragón Radio: en vespera programo "Escúchate" aperis intervjuo al Lorenzo Noguero.

Ankaŭ en Valencio, la membroj de la Grupo de Esperanto Raúl Salinas kaj Iván García estis intervjuitaj en la programo "Podríem estar millor" de la regiona radio À Punt.

La gazetarkomuniko de HEF estis krome publikigita en kelkaj retĵurnaloj, inter kiuj la madrida Gacetín Madrid.

## KAJ ANKORAŬ

La *BK-Festo*, Ceremonio de Disdono de Premioj de la Belartaj Konkursoj de UEA, okazos la 19an de septembro je la 14a horo UTC (tio estas la 16:00 horo por Hispanio). Gvidota de Miguel Fernández kaj Miguel Gutiérrez Adúriz, multaj belaj surprizoj atendas vin.




Ankaŭ tiun tagon okazos la "Tago de veteranoj", kiun ĉi-jare UEA dediĉas al Gian Carlo Fighiera, itala esperantisto kiu dum multe da jaroj tiom vigligis la madridan esperantistan movadon.

Vizitu EventaServo.org aŭ atentu la komunikojn de UEA por scii pri rimedoj por ilin spekti.

## ANA MANERO PREZENTIS BITOTEKON EN KROATIO

Dum la monato aŭgusto nia samgrupano Ana Manero havis okazon prezenti la Bibliotekon Juan Régulo Pérez kaj la Bitotekon de HEF en renkonto de la projekto *Reta Edukado Nun* de Erasmus+, dediĉita interalie al la temo de pretigado de ciferecaj dokumentoj, efika arkivigado kaj bonkvalita libro-eldonado. Ĝi okazis en Đurđevac, Kroatio, de la 12a ĝis la 16a de aŭgusto 2021, gastigita de Dokumenta Esperanto-Centro, kaj estis spektebla rete.

La projekto estas kunordigata de Bjalistoka Esperanto-Societo (Pollando), kaj partoprenas Dokumenta Esperanto-Centro (Kroatio), Esperanto-KulturCentro Tuluzo (Francio), Bunta Esperanto-Asocio (Italio) kaj Kosmo Strategio ltd. (Britio)

## STUDAĴO PRI ESPERANTO EL ANTROPOLOGIA VIDPUNKTO

Nia juna amiko Jorge Brasal prezentis sian finstudan laboraĵon (*Trabajo de fin de grado*) por kompletigi siajn studojn pri Socia kaj Kultura Antropologio (*Grado en Antropología Social y Cultural*) en la Aŭtonoma Universitato de Madrido. La titolo estis "El Esperanto: lengua y comunidad en el siglo XXI". Li atingis noton de 9,4. Gratulon al Jorge!

La teksto estas konsultebla en la retejoj de la Bitoteko kaj en Edukado.net, ĉe la adreso: https://edukado.net/biblioteko/diplomlaborajhoj?iid=350.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

~~Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo~~

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com